



# **NORDHUNGARIA INFORMO**

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc**

Majo 2008

## Tartalom

MAJO .....	3
2008: Internacia Jaro de la Planedo Tero .....	5
Lernu-renkontiĝo .....	7
LINGVO – LINGVOJ .....	7
Eseo .....	7
Bonega Informo .....	10
Senhonta almuzulo .....	12
Mia Paskfesta veturado .....	12
Hungespola-renkonto 4-6 Aprilo 2008-a .....	14
Gramatika rerigardo neniam malsufiĉas .....	16
ILEI INVITAS VIN AL KONFERENCO EN AFRIKO! .....	17
HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO .....	18
Pri Nordhungariaj Esperanto-Renkontiĝoj .....	20
Ŝerco .....	21
Mituloj .....	21
Nordhungario – hungara literaturo .....	22
De buŝo al buŝo .....	24
FUNEBRO .....	26

# MAJO

## Riverenco Karaj, niaj legantoj!

„Bluas la ĉielo, verdas la herbo, kaj grandiozas la vivo...” kantas la kantistino en iu hungara populara kanto. Jes, en majo jam tute verdiĝas, plibeliĝas la naturo. Sed, tiun ne ĉiuj homoj povas ekvidi, trasantaj, ĉar multaj homoj havas diversajn korpajn, aŭ animajn problemojn, malsanojn. Kaj tiuj signifas provizoran aŭ porĉiaman ŝarĝon al la homo. La tagoj kunfluas, aspekte tutsamaj. La suferantoj ne ekvidas eĉ la etbelecojn de la vivo, kiuj plibeligas la ĉiutagojn kaj ripozigas.

Antaŭ nelonge, pro publikvoja akcidento mi estis flegita en iu hospitalo. Filo de mia hospitala samĉambrino turnis sin al ni kun la sekvaj vortoj:

„Mi estas la „disdonanto de feliĉo” – kaj li metis sian manon en nevideblan korbon, poste al ĉiuj donis plenmanon da feliĉo. Kaj ni aŭdis plu jene lian molan, varman, belsonan virvoĉon:

„En ĉiu homo enestas feliĉo, per kiu la homo povas rimarki la ĝojon kaj la etajn belecojn de la vivo. Kaj tiun ĉi tie – kaj tiam li montris al siaj frunto kaj koro – oni devas bone gardi, same, kiel oni gardis la fajron iam. Tiu ĉi estas tia fajro, kiu donas konsolon, korvarmon. Mi, nun transdonis iom el ĝi al vi, por travivi pli facile tiun dolorplenan tempon,... sed, vi ja bone gardu ĝin...”

Ĉi tiuj riverencaj vortoj venis nun en mian kapon, kiam mi surrigardis la majan kalendaron de eventoj. Ja, ĉiu popolo havas memortagojn, naciajn-, sociajn-, familiajn festojn, kiam ni festas memorante pri gajaj aŭ malgajaj eventoj de niaj antaŭuloj, memoras pri la venkoj, bataloj aŭ malvenkoj, kaj ni ĉerpas forton al la estonto. La okazintaĵojn de la mondo, bone montras la evento-kalendaro de la vikipedio.

Ĉi tiuj estas la tagoj de la internacia aŭ nacia riverenco. Nun ni mencias kelkajn el tiuj:

**3. Majo** Tago de la konstitucio en Japanio kaj en Pollando, en Ĉinio Tago de la Junularo,, en Nederlando: Tago de la liberiĝo (Tago 1945. jara kapitulacio de germanaj armeoj)

**3. Majo:** *Tago de la Internacia Preslibereco*; dum kiu oni tutmonde rememoras pri tiuj ĵurnalistoj, kiuj mortis dum plenumo de siaj ĵurnalistaj laboroj.

**La unua dimanĉo de Majo:** *Tago de Patrinoj* en Hungario

Okaze de tiu tago vi povas legi belan poemon de la granda hungara poeto:



Kopcsik Marciapanio en Eger

**Attila József (1905-1937)**

### **Mia patrino**

Poteton prenis ŝi dumane  
dimanĉe kiam ekvesperis,  
ŝi milde-mute ekridetis  
kaj iom sidis duonombre.

De l' ekscelencoj sian propran  
manĝeton ŝi por ni alportis,  
ni enlitiĝis, mi imagis,  
ke tiuj manĝas plenan poton.

Mia patrino mortis frue,  
ja lavistinoj frue mortas,  
pro ŝarĝoj tremas piedoj,  
la kap' doloras pro glado –

Mont-panoramo: lavotaĵoj!  
nub-ludo por freŝiĝi nervojn:  
vaporo, kaj por lavistino  
la klimatŝanĝo: subtegmento.

Mi vidas' haltas ŝi en glado.  
Ŝian fragilan korpon romp  
la kapitalo: ŝi etiĝis –  
pripensu tion, ho proletoj –

Pro lavo ŝi kurbiĝis iom,  
kaj mi ne sciis, ke ŝi junas,  
ŝi songis antaŭtuko pura –  
ŝin la poŝtist' salutis tiam.  
(1931)

Esperantigis: Imre Szabó /Attila József: Urboranda Nokto-  
Elektitaj poemoj 1986/

- 5. Majo:** ekde 1964 Tago de Eŭropo  
**6. Majo:** *Tago de Martiroj* en Libano kaj Sirio  
**11-12. Majo** Pentekosto  
**15. Majo:** *Tago de la Besto- kaj Plantoamo-* en Hungario, kiun iniciatis la Ĉefurba Zoo kaj Botanika Ĝardeno. Samtage ni rememoras ankaŭ pri *memortago de la hungardevenaj loĝantoj de Slovakio*.  
**16. Majo** *Nacia festo de Rusio*  
**18. Majo.** *Mondotagoj de Interreto kaj Muzeoj*, krome Tago de la Geologia Naturprotektado. Tie ni proponas legi la artikolon de profesoro Károly Brezsnyánszky (Karlo Brejnjanski)  
**19. Majo:** Internacia Tago de Viroj  
Ĉi okaze ni salutas la vir-helpantojn kaj la karajn virlegantojn de nia

- gazeto!
- 24. Majo:** ekde 1973, *Tago de la Eŭropaj Naciaj parkoj*, 34 landoj aliĝis al tio, kaj respondecas pli ol 400 teritoriojn. La unuaj Eŭropaj Naciaj Parkoj fondiĝis la 24-an de majo en 1909 en Svedio.
- 25. Majo:** *Tago de liberiĝo de Afriko*, krome en *Jordanio* *Tago de la Sendependeco*, en *Argentino* la *memortago de la maja-revolucio* en 1810
- La lasta dimanĉo de majo:** en Hungario la *Tago de Herooj* krome *Tago de Infanoj*.

Adrienne, sinjorino Pásztor

**Karlo Brezsnjányzky**

## **2008: Internacia Jaro de la Planedo Tero**

### **Tersciencoj por la homaro**

*Okaze de la 50-a datreveno de la Internacia Geofizika Jaro (1957-1958)*

La Internacian Jaron de la Planeda Tero, kiu estis komuna iniciato de la Internacia Unio de Geologiaj Sciencoj (IUGS) kaj UNESKO, adoptis ankaŭ OUN (Organizo de Unuiĝintaj Nacioj).

La homaro tutmezure dependas de la Tero. Ni povas ekzisti nur en mem-konservanta Tersistemo. Ju pli da scio ni akiras, des pli klare ni vidas, ke ni devas protekti la Teron, ĉar la estonto de niaj ideoj, niaj posteuloj dependas de ĝi. Ni devas komprenigi al la societo, ke la ŝlosilo de la daŭrigebla disvolvo estas la terscienco.

La tersciencistoj jam malkaŝis multajn sekretojn de la Tero kaj atingis imponan progreson en la kompreno de ties funkciado. Bedaŭrinde la homaro ne uzas konvene tiun scion. Oni konstruas en ne-taŭgaj lokoj, oni detruas nur unufoje ekspluateblajn resursojn, spite de tio, ke la naturaj riskoj estas sufiĉe fidinde antaŭdireblaj. Ni ŝajnigas scii nenion, kvankam la ŝlosilo de la pli bona vivo estas en niaj manoj. La tersciencistoj ĉie en la mondo estas pretaj kaj preparitaj por krei pli sekuran, pli sanan kaj pli riĉan vivon.

La logo / emblemo de la Internacia Jaro de la Planeda Tero simboligas la kunagadon de la esploristoj de la sistemo-Tero. La ruĝa koloro signifas la solidan teron / la litosferon/, la melhelblua – la hidrosferon, la verda- la biosferon, la helblua – la atmosferon.

La scienca kaj sciencon populariga programo de la Internacia Jaro de la Planedo-Tero proponas dek temojn interdisciplinajn, kiuj estas decide gravaj por la estonto de la homaro. Jen:

1. La subsurfacaj akvoj – la plej granda provizo de trinkakvo
2. La naturaj danĝerfontoj minacantaj la homajn komunumojn
3. Tero kaj sano – por konservi la sanan vivmedion
4. Ŝanĝiĝoj de la klimato – dum la terhistorio kaj nun
5. Konscia mastrumado pri la energifontoj kaj mineralaj krudaĵoj
6. Esploro de la terinterno, ekkono de ties strukturo
7. Esploro de la oceanoj kovrantaj du trionojn de la tersurfaco

8. Kreado de scienca bazo por la sekura konstruado kaj funkciigo de megapolisoj /grandegaj urboj

9. Daŭrigebla utiligado de la grundoj

10. Protekto de la biosfero, de la vivularo de la Tero

### **Eventoj en Hungario**

En Hungario la aranĝojn kunordigas Nacia Komitato estigita de Hungara Scienca Akademio kaj UNESKO. / Prezidanto: Karlo Brezsnýánszky; sekretario: László Szarka; trezoristo: Johano Haas./

La programo grandparte fondiĝas sur la mem-aktiva agado de kelkaj organizaĵoj: Hungara Geologia Societo / [www.foldtan.hu/](http://www.foldtan.hu/), Societoj de Hungaraj Geofizikistoj / [www.mageof.hu/](http://www.mageof.hu/), Geologia Instituto de Hungario / [www.mafi.hu/](http://www.mafi.hu/), L. Eötvös Geofizika Instituto / [www.elgi.hu/](http://www.elgi.hu/), Geodezia kaj Geofizika Esplorinstituto de Hungara Scienca Akademio, en Sopron / [www.ggki.hu/](http://www.ggki.hu/)), kaj pluraj universitatoj.

**La novaĵoj estas legeblaj en la retpaĝo / [www.foldev.hu/](http://www.foldev.hu/) /**

La alta protektanto estas László Sólyom, prezidanto de la Hungara Respubliko. Protektantoj de la aranĝoj estas inter aliaj Silvestro Vízi E., prezidanto de Hungaria Scienca Akademio kaj Jozefo Hámori, prezidanto de la Hungaria Nacia Komisiono de UNESKO.

Ankaŭ hungaraj gestudentoj partoprenis en la tutmonda studenta konkurso, kies venkintoj estis invititaj al Parizo, por ĉeesti je la inaŭgura aranĝo de la Internacia Jaro de la Planeda Tero, 12-13-an de februaro 2008, en la Palaco de UNESKO. Hungarion reprezentis Krisztina Kármán, studentino pri geologio de la budapeŝta universitato ELTE.

La 18-20-an de aprilo okazos solena centra malferma aranĝo en la Hungara Naturscienca Muzeo en Budapeŝto. Tion sekvos ekspozicioj kaj prelegserioj en pluraj provincaj urboj. Nepre menciindas la terscienca konferenco por mezlernejaj studentoj organizota de la Universitato de Miskolc.

Dum la jaro 2008 estos projekciata serio de geologiaj filmoj kaj estos publikigitaj 12 kajeroj popularigantaj tersciencon.

/ Fonto: László Szarka, sekretario de la Nacia Komitato por la Internacia Jaro de la planedo Tero. HSA, Sciindaĵoj, 21.01.2008./

<http://209.85.135.104/search?cache:9yqq17Z1.V0J:www.mta.hu/index.p...2008.02.16>

**Tradukis d-ro Endre Dudich**

## Lernu-renkontiĝo

„Estimataj,

nome de E@I kaj lernu-teamo mi volas vin informi, ke **ĉi-somere okazos unua renkontiĝo de Lernu! - uzantoj, helpantoj kaj kreantoj.**

Ĝi okazos inter la **9-a kaj 17a de aŭgusto, en Slovakio**, urbeto Modra, nur 30 km de ĉef-urbo Bratislava.

Krome, ke ni elkore invitas vin ĉiujn partopreni la aranĝon, ni ankaŭ petas vin pluinformi pri la aranĝo ene de viaj kluboj, organizoj, asocioj, bultenoj, paĝaroj...

Detaloj pri la aranĝo troveblas ĉi tie:

[http://eo.lernu.net/pri\\_lernu/renkontighoj/SES/index.php](http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php)

Vi povas helpi al ni reklami la aranĝon ankaŭ per enmeto de lig-butono (banner) al via paĝaro - 4 divers-grandajn ligbutonojn por tio vi trovos ĉe:

[http://eo.lernu.net/pri\\_lernu/informiloj/ligbutonoj.php](http://eo.lernu.net/pri_lernu/informiloj/ligbutonoj.php)

Elkoran dankon nome de la organiza teamo

Peter Baláž (Petro)

E@I-kunordiganto

[petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net)

[www.ikso.net](http://www.ikso.net)

**From:** [assembleo-eeu@googlegroups.com](mailto:assembleo-eeu@googlegroups.com) [<mailto:assembleo-eeu@googlegroups.com>] **On Behalf Of** Peter Baláž: [EEU-sembleo] Lernu-renkontiĝo somere!

**Adrienne, sinjorino Pásztor**

**La 2008-a, estas**

**Jaro ankaŭ de la**

**LINGVO – LINGVOJ**

### Eseo

Kaj Vi, kaj ni scias ke, kia estas la printempa murmuro, kiam la naturo reviviĝas. Ni devas atenti, kaj ni ekaŭdos mil-voĉojn de vivularo de la Tero. Sed ekzistas voĉoj neaŭdeblaj al la homaj oreloj. Foje mi aŭdis de maljunulo, ke ne nur la bestoj kaj homoj, sed ankaŭ la arboj parolas. Tiam mi ridetis iom en mi pri ĝi. Sed foje iam dum arbarrande travivita ŝtormo mi pripensis, la malfabelon de la estinta multjarulo. Dum la ŝtormo la arboj knaris-krakis, ilies kelkoj kliniĝis perbranĉe al tero. En la ŝtormo la birdoj timeme pepetis, mi aŭdis homkriojn, tirbojon de hundo timanta de la fulmo kaj tondro. Ĉiu-ĉio parolis, sed aliel. Mi aŭdis la voĉojn de ilia parolita lingvo. Parolo de la plantoj prezentiĝas pro vivmedia influo, ĉe la bestoj ĝi estis instinkta, ĉe la homo ĝi prezentiĝas de ambaŭ. Sed, ankaŭ la bestoj aplikas ankaŭ movsignojn krom la voĉsignoj, por esprimi siajn sentojn. Ekzemple: kiam la katoj volas pariĝi. Ili alvokas la atenton al mem ne nur per siaj interesaj voĉoj. Tiam la rulado estas unu el inter siaj korpo movoj. Ankaŭ la formikoj donas voĉ- kaj movsignojn kvankam ilian parolon

ni ne aŭdas. Herman Ottó – la granda hungara 19. jarcenta poliscienculo – kaŝobservis, poste priskribis, ke la formikindividuloj kiel donis signojn unu al la aliaj, trovantaj nutraĵon.

La homa infano unue aŭdas nur voĉojn post naskiĝo

Poste li lernas ĉi tiujn ligi al la diversmaniere rimarkitaj signoj ĉirkaŭataj lin. Ekzemple: al la gepatra vizaĝo, mimiko, al paroloj de gepatroj kaj aliuloj, al vidaĵo de la lin / ŝin ĉirkaŭantaj objektoj, kaj al siaj spertoj devenantaj el eventoj. Kaj jen, li / ŝi kiel multe lernis jam dum la tempopaso. La rezulto de la ĉiutage aŭskultata (la gepatra) lingvo kaj plimultiĝo de scioj estas, ke la infano povas esprimi sian dormemon aŭ alian neceson, kaj ne nur per sia diversvoĉtona ploro.

Ankaŭ li/ŝi volas pli bone komprenigi sin kun siaj ĉirkaŭuloj. La bebo ekvoĉas, poste diras pli kaj pli da voĉoj, fine alproprigas la parolon.

Niaj gepatroj parolas al ni gepatrolingve, laŭ ĉi lingvo ni sonĝas, kaj unuopuloj blasfemas gepatrolingve. Kvankam ankaŭ tio povas okazi, ke iu konsideras sia patrinlingvo, la lingvon de aliuloj. La alproprigo de la gepatra lingvo, estas longa procezo. Ankoraŭ en nia maljunaĝo povas okazi, ke ni renkontas pli frue nekonatan vorton, esprimon. La plueduko de la infano daŭras per instruo de etpoeemoj, diraĵetoj, kaj per laŭaĝaj bildlibroj, libroj en presita formo de la parolata lingvo. La alproprigo de sia ĉiutage aplikata lingvo (unue la gepatrolingvo) servas la plilarĝiĝon de la konoj, la akomodigiĝon en sian medion, la pli bonan disvolviĝon de sia individueco, la komprenon de pensoj de aliuloj. Ankaŭ niaj lernejoj studoj daŭras patrinlingve. En Hungario ekzistas ankaŭ naciminoritataj bazaj, mezaj kaj altaj lernejoj al alproprigo de la patrinlingvo de la alietnikuloj inter niaj limoj vivantaj. El la legaĵoj kaj el alproprigo de helpantaj voĉaj helpmaterialoj la homo povas ekkoni ankaŭ la fumsignojn de la malnovaj popoloj kaj la signifojn de la afrikaj tamburoj. Eĉ, ankaŭ oni povas ekkoni la trafikajn lum- kaj voĉsignojn de nia epoko, kiuj estas signoj elformigitaj laŭ antaŭaj konsentoj. Ankaŭ la movoj de vizaĝo kaj mano - kiuj estas samaĝaj per la homaro – estas same signoj. Ĉi tie mi pensas pri dancoj de la orientaj popoloj, kaj precipe pri la araba, hinda kaj ĉina. Kiu ne konus tiujn? Per mirindaj mimikoj kaj tehniko ellaboritaj manmovoĵoj la homo kapablas realigi tutajn historiojn, eventojn de tre malnovaj tempoj per la danclingvo, subpentrite per la lingvo de muziko. Ĉi tie mi devas mencii la muzikon faritan per diversaj muzikinstrumentoj. Se mi rememoras tion, ke la iaman bazon de la nuna komplikagorda muziko donis: kunbatadoj de du ostoj aŭ lignopecoj, aŭ la surblovo al la arbofolioj tenitaj inter fingrojn, do la mondo multe ŝanĝiĝis. Sed, vi pensu ankaŭ tion, ke en kiom multe da verkoj rolas la vento-murmuro, la mar-muĝo, la birdpepado. La homo ĉiam kreis atentindajn kreitaĵojn, se reiris al la naturo, por ĉerpi inspiron de tie. Se ni parolas pri signoj aplikataj en homa parolo, ni devas mencii la gestolingvon de surdmutuloj. Ĉi lingvo baziĝas jam ne sur la eligitaj voĉoj, ĉar ĝin la mankhava homo ne aŭdas aŭ ne povas elparoli. Ĉi "parolita lingvo" estas sistemo de tre precize prilaboritaj kaj ellernitaj signoj. En 2007 (Budapeŝto, en la Landa Fremdlingva Biblioteko) okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj, mi ĉeestis unu prelegon, kiam oni konigis la gestolingvon de surdmutuloj. La surdmutulan gestolingvon „parolanto" montras per siaj fingroj la nocion, koncepton, vortojn, esprimojn aŭ eĉ ankaŭ tutajn frazojn sed tiu montras ilin ankaŭ per sia mienludo, kaj per la lipformado. Se ni pensas: kiom da popoloj ekzistis jam dum historio de la homaro, kiuj jam formortiĝis kune kun sia lingvo. Ni devas pensi – kiel bonas, ke la lingvoj ekzistas ne nur en la parola formo, sed ankaŭ skribforme. Tielmaniere ni havas almenaŭ skribitan memoraĵon pri ĉi tiuj popoloj, lingvoj. Feliĉe la skribo, kio estas la signalsistemo akceptita laŭ interkonsento, gardas niajn pensojn, konojn por pli longa tempo, ol la homa menso dum unu homvivo, aŭ la lingvomemoraĵo disvastiĝanta de buŝo al buŝo. El la verko Historio de Herodotos, greka verkisto (a.Kr. 484-425), kion esperantigis s-ro Spiros Sarafian, ni povas ekkoni aron de la antikvaj popoloj, kaj kiom da ili formortis jam. Ni ne sciis pri ili, se Herodotos ne skribintus pri ili.



El la diversaj verkoj ni povas ekkoni ankaŭ la devenon de la eŭropaj popoloj. Ĉi tie mi citas esperantigitajn voĉojn de la franca aŭtoro (kies franclingvan verkon esperantigis d-ro Endre Dudich): „La plej grava historia evento estis la alveno el la regiono de Kaŭkazo, Irano kaj Norda Hindio, de tiuj popoloj, el kiuj poste evoluis la nacioj parolantaj la lingvojn *Balto-Slavajn, Slavajn, Keltajn, Grekan, Latinajn kaj Germanajn*. Tio okazis ĉirkaŭe antaŭ kvar mil jaroj. El la pli fruaj, „Pra-eŭropaj” lingvoj survivis tiun migradon nur la baska...” Estas prezentitaj etimologioj de lando kaj urbnomoj. Ekzemple *F r a n c i o* estas la lando de la germana tribo, de la Frankoj. Rusio estas lando de la ruĝhavaj Varegoj (La orienta branĉo de Vikingoj.).

Ekde pratempoj multaj specioj de la skribo estas konataj. Oni skribis per kano sur argiltabulon (Tiu argiltabul-biblioteko estis la forbruliĝinta Granda Biblioteko en Aleksandrio), oni ĉizis skribsignojn sur ŝtonon, lignon, oni skribis sur papiruson, paperon. La kono plimultiĝon sekvis evoluo de teĥniko. La elpensado de la germana tipografo Guttenberg (1394-1468), la libropresado per la moveblaj literoj, iĝis grava faktoro de la homa kulturo. En Hungario la ekiro de ĉi libropresado ligiĝas al nomo de Andreo Hess, alveninta el la renesanca Romo en Buda (norda parto de la nuna Budapeŝto) en 1472. Li estis invitita de preposto de Buda: Karai, László, subkancelerio de la reĝo Hunyadi Mátyás (Matiaso Hunjadi). La CHRONIKA HUNGARORUM (Kroniko de la Hungararo) titola, lia historia verko estas la plej malnova hungara presaĵo, presita en 1473.

La presitaj vortaroj, lingvo-lernolibroj plifaciligas la elproprigon de la lingvoj. Ankaŭ skriboj, skribmanieroj estas multspeciaj.


Tiuj-ĉi skribmanieroj estas ekzemple: la runo, la ciril-alfabeta skribo, la latinlitera (presitlitera kaj manskriba) la armena, la gotika, la irlanda, ks. Tiuj ĉi estas aŭropaj, ankaŭ nuntempe uzitaj skribmanieroj. Ni Hungaroj aplikas la latinliteran skribmanieron. La ĉina lingvo kaj skribo, la ĉina piktografio estas malfacila por elproprigi al ni Eŭropanoj. Mi legis pri la ĉina skribo: el la libro „Sciencaj Studoj”, eldonita en Kopenhago en 1958. Je Laishi skribas – en tiu ĉi libro – ke la ĉinaj hieroglifoj havas historion pli longan ol 3000 jaroj.

„Same, kiel la antikvaj egiptaj skriboj, la ĉinaj hieroglifoj devenas de desegnoj. Dum la pasintaj jarmiloj, tiuj skribsignoj multfoje signife sanĝiĝis en la strukturo kaj skribmaniero, sed ĝia fundamento, la heroglifa sistemo, restas senŝanĝa. La strukturo de la ĉinaj hieroglifoj estas tre komplikita: ĉiu hieroglifo meznombro konsistas el pli ol 12 strokoj. En la signo mem ne montriĝas la sono. Tial, oni devas memori ĉiun signon aparte. Kaj la tuta nombro de tiuj signoj estas pli ol 50 000...”

Por legi ĉiutagan ĵurnalon kaj popularan legaĵon, oni bezonas almenaŭ 3500 signojn....”

Ĉiu popolo mem decidas pri la uzata skribmaniero, en sia kulturo. La samo koncernas ankaŭ al la individuo, kiu alproprigas ankaŭ aliajn lingvojn krom la gepatrolingvo. Liberas la elekto. Niatage la faklibroj taksas nombron de lingvoj de la mondo 6-7000, la plej granda lingvo – parolata sur la plej granda lingvotereno, multegoj parolas – estas la ĉina. Ĝin sekvas la nombro de la parolantoj de Hinda Lingvo. La nombro de la parolantoj de la unuopaj lingvoj – atentante ankaŭ la pliajn lingvojn uzantojn, - estas inter la kelkcentoj kaj plurcentmilionoj. La nombron de parolantoj de la ĉina kaj la hinda lingvoj parolantoj, sekvas la angla, franca, japana, hispana, germana ks.

- daŭrigo sekvos -



La supra paĝo de libro **SCIENCAJ STUDIOJ**.

## **Bonega Informo**

Betreff: (landa agado) Trajno Zamenhof (komuniko el Bjalistoko)

Dank' al la afabla helpo de la Direkcio de la Regiona Trajna Kampanio en Bjalistoko, laŭ la propono de la Urbestro de Bjalistoko, kun la financa subteno de la Marŝalo de la Podlaĥia Vojevodio en la somera horaro ekestos la trajno ZAMENHOF.

La 1an de junio 2008 ĝi startos la unuan fojon longan vojon de Bjalistoko al Bielsko-Biala. Sur la kajo, apud la trajno, je la 06.05h. okazos solena "bapto"; kaj poste la adiaŭo de la trajno kaj de Ludoviko kaj Klara Zamenhof, kiuj kuraccele forvojaĝos "al akvoj".

Survoje, ĉe la Centra Stacidomo de Varsovio kaj en Katowice salutos la Familion Zamenhof esperantistoj atendantaj sur kajoj. Surloke, en Bielsko-Biala, gesinjoroj Zamenhof renkontiĝos kun la honora komitato, kiu sub la gvido de eŭrodeputino Margerita Handzlik atendos ilian alvenon. Posttagmeze ĉiuj partoprenos la feston okaze de Internacia Tago de Infano, reklamos Esperanton kaj la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof. Pri la vestaĵo el la epoko por la Familio Zamenhof zorgos la Dramteatro en Bjalistoko. En la trajno estos disdonitaj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko. Per la trajna mikrofono Ludoviko rakontos al vojaĝantoj pri la ideo kaj la lingvo universala. La evento okazos sub la media protekto de la TV Bialystok kaj la televidkanalo TVN.

Ĉiuj, kiuj dezirus kunorganizi la festan vojaĝon de la trajno estos bonvenaj. Kontakto nin uzante la retadreson:  
[esperanto.bialystok@interia.pl](mailto:esperanto.bialystok@interia.pl) <mailto:esperanto.bialystok%40interia.pl>

"Leviĝanta Bjalistoko" — jen la slogano, per kiu dum la 4 venontaj jaroj estos promociota la ĉefa urbo de Podlaĥio. Laŭ la mendo de la urbestro Tadeo Truskolaski la firmao Grupo Eskadra, kiu okupiĝas pri la promocio de urboj, prilaboris la strategion de la promocio de Bjalistoko. "Temas ĉefe pri tio, ke ni deziras montri Bjalistokon kiel la urbon vivantan, dinamikan, modernan kaj substrekantan sian ekziston, kulturon kaj tradicion", — diris la vicurbestro pri kulturo Tadeo Arlukoviĉ. La strategio bazigas sur la multkultureco de Bjalistoko. Grupo Eskadra vidas ege grandajn eblecojn de la promocio pere de Esperanto. Aldona argumento estas la fakto, ke en la jaro 2009, ĝuste en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, estos organizota la 94-a UK.

(Ela Karczewska (Bjalistoko, Pollando)- Leopold Patek – d-ro Imre Ferenczy)

### **Balys Giedra**

#### **STRANGA ESTAS NIA VIVO**

Stranga estas nia vivo:  
Malbenita sorto  
Ciun homon akompanas  
De lulil' ĝis morto.

Kiam floras la juneco  
Kaj la sango bolas,  
Mankas mono, mankas ĉio  
Kion koro volas.

Kiam venas maljuneco,  
Malaperas forto,  
Kvazaŭ spite ekaperas  
Mono kaj komforto.

Ĉu alvenos iam tempo  
Sen fatala oro,  
Por ke sentu la feliĉon  
Malfeliĉa koro.

(Giedra Balys, 1897-1953, naskiĝis en komunumo Joniškėlis -. Sendis: Andrzej Sochacki –  
Pollando)

## Senhonta almozulo

Almozulo frapas ĉe la pordo de tre riĉa bankisto je la dua horo nokte: Bum! Bum! Bum! Kune kun sia ĉefservisto la riĉulo eliras negliĉe, kun taŭzita hararo. Tra la iom malfermita pordo diras la almozulo: "Bonvolu doni al mi iom da mono."

Riĉulo: "Ĉu vi freneziĝis? Je la dua nokte? Kion vi faras? Ĉu vi ne komprenas? Oni ne venas al nekonataj homoj je tiu horo! Estas hontinde! For, for! Lernu iom da bonaj kondukmanieroj! Kia homo vi estas? Kiel vi kondutas?"

Almozulo (iom ofendiĝinta, ekkriante): "Aŭdu, sinjoro! Mi ne istruas al vi kiel devas agi bankisto. Do, bonvolu ne instrui al mi kiel almozpeti!"

(La sendinto estas Josef Shemer el Israelo)

## Teodor Andreas

### Mia Paskfesta veturado

Miaj parencoj, kiuj vivas en la ĉefurbo de Hungarujo min invitis – ankoraŭ dum Novjaro –, ke mi venu al ili denove, por kune travivi Paskfeston 2008. Mi akceptis tiun inviton kaj sabaton, la 22-an de marto komenciĝis mia vetur-aventuro.

Aventureska estis jam la elektita vojo: anstataŭ la plej mallonga veturvojo de Košice tra Hidasnémeti, mi elektis vojjon pli longan: Košice–Slovenské Nové Mesto–Sátoraljaújhely–Miskolc–Budapest. Por tiu ĉi elekto mi havis 2 kialojn, unu elinter ili estis, ke mi volis vidi propraokule, kiel aspektas la landlim-trairejo por piedirantoj inter la slovakia kaj hungaria partoj de tiu apudlandlima urbo.

Do la trairejo estis fakte tute simpla: la domo de la landlim-gardistoj estas fermita, turistoj aŭ simplaj piedirantoj povas libere trapasi la imagitan linion - landlimon sen ia ajn bariloj. La fera vojbarilo, kiu malebligis la aŭtomobilan trafikon ĉe tiu loko, estis forigita. Tre stranga fakto ja estas, ke post du tagoj ĝi estis anstataŭigita per du grandaj beton-florujoj, kiuj denove malebligas por aŭtomobilistoj la traveturadon. Ili do devas tamen uzi la traveturejon, kiu troviĝas ĉe la norda rando de urbo Sátoraljaújhely. Por tiuj, kiuj loĝas oriente de Slovenské Nové Mesto, tio signifas plilongigitan veturvojon je ĉirkaŭ 6 kilometroj.

Mi atingis la "grandan stacidomon" de la urbo Sátoraljaújhely sen ia ajn problemo, la vojo estis por mi bone konata, 4 jarojn de mia infanaĝo mi travivis antaŭ multaj jaroj en tiu-ĉi urbo. La vagonaro estis baldaŭ preparita por la vojaĝanta publiko, da liberaj sidlokoj estis sufiĉe. Baldaŭ post mi eniris la kupeon kvarmembra familio: panjo, filino-fraŭlino kaj du knaboj-fratoj. La malpli juna el tiuj du knaboj eksidis kontraŭ mi, la alia apud mi.

La tempo de la foriro de la vagonaro alvenis, la deĵoranta vagonar-ekspedisto ekfajfis kaj levis la verdan disketon. La vagonaro ekmoviĝis.

Tuj post la ekmoviĝo de la vagonaro tiu kontraŭ mi sidanta proksimume dekjara knabo komencis manĝeti. Unue nur salitajn stangetojn, post kiam la saketo malpleniĝis, sekvis ia dolĉa napolitana stangeto, foje-foje miksitaj kun kelkaj glutoj da teo aŭ io simila. La tutan procedon de la nutrado zorgeme priatentis lia panjo, foje-foje per kelkaj edukantaj vortoj, kiuj koncernis la decan formon de la manĝado en societo, alifoje per kelkaj teneraj, sed nerezisteblaj manmovoĵoj kun poŝtuko, forviŝante iajn erojn de sur la buŝo.

Post forkonsumiĝo de tiu dolĉa stangeto kun kelkaj glutoj da limonado mi opiniis, ke eble nun jam la junulo estas finfine satmanĝinta, kaj li turnos sian atenton al la pejzaĝo, tra kiu veturis la vagonaro. Lia intenco ja estis malsama: post kiam lia panjo eltiris el ŝia saketo paperan

pakaĵeton, kiu enhavis sandviĉon: bulkon kun ŝinko, la junulo kun evidenta bongusto komencis daŭrigi la manĝadon...

Mi ekhavis ideon, ke por tiu familio la ĉefa celo de la tuta veturado ne estis la ŝanĝo de ilia geografia pozicio, sed la nutrado de tiu plej juna membro de la familio. (Se vi pensas, ke la figuro de tiu juna knabo devis esti brave dika, do ne pensu tion. Lia figuro estis kvazaŭ ia iomete pli dika – fadeno.)

Do tiel la tempo kaj la traveturita distanco iom post iom kreskis kaj alproksimiĝis la stacidomo de Miskolc. Nia familio feliĉe sukcesis ĉion formanĝi, kunkolektis sian vojaĝpakaĵon kaj kun deca saluto: ĝis revido! forlasis la vagonon. Ĝis bongusta revido, kara malsatulo..!

Post 20-minuta reorganizado de la vagonaro ĝi estis daŭrigonta la veturadon al Budapeŝt. Mallonge antaŭ la forveturo eniris la vagonon alia interesa vojaĝanta duopo. Sur la seĝon kontraŭ mi eksidis juna knabineto – laŭ mia takso proksimume 4–5-jara kaj apude ŝia avino. Kontraŭe al tiu knabeto, kiu estis ekipita precipe per manĝaĵo, tiu knabineto kunportis sufiĉe grandan ruĝan lernejan aktujon, kiu enhavis – kiel tio baldaŭ montriĝis – ŝiajn kulturajn bezonaĵojn. Baldaŭ post forveturo el Miskolc ŝi eliris el la aktujo kolorajn kraĵojn kaj paperfoliojn, sur kiuj ŝi komencis krei siajn artaĵojn. La tuta etulino sin kondukis tute senzorge sed vigle. Ĉiun minuton ŝi ŝanĝis sian sidpozicion, turniĝante foje dekstren, foje maldekstren. La tuta ĉirkaŭanta mondo, kun la vagonaro, kun la tuta vojaĝantaro estis por ŝi kvazaŭ butoneto. Neniu homo, nenia objekto meritis ŝian atenton, krom ŝia kultura agado kun koloraj kraĵoj. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke ŝi min tamen rimarkis, kiam mi ekhavis en mia mano mian poŝtelefonon (kun fotoaparato), sed tiu intereso daŭris nur eron da momento, ŝi konstatis simple, ke tiu kunveturanta onklo havas en manoj ion telefoneskan, sed neniel povas ŝin en la arta agado ĝeni.

Kaj mi kondukis – memkompreneble – laŭeble nerimarkeble, sed tamen klopodis fari kelkajn fotografiaĵojn. Kio altiris mian atenton, mian emon fari fotojn pri tiu eta knabino, mi ne povis diri. Ŝi estis tute simpla, normala infano, neniel eksterordinare beleca, sed sane vigla, bonhumora, kiel mi taksis.

Mi rimarkis ankaŭ tion, ke tiu infano dum la tuta longa vojo preskaŭ nenion konsumis, krom eble kelkaj glutoj da teo. La avino sidis apude la tutan vojdon senvorte, nur kelkfoje ŝi demandis, ĉu ŝi ne soifas.

Kiam mi vidis, ke la objekto de mia intereso faras neniajn zorgojn pri mia fotado, do mi fotis jam pli kuraĝe, eĉ faris kelksekundan videosekvencon, kiun mi montris poste al ŝi kaj ankaŭ al avinjo. Tiel mi povis ekscii ŝian nomon – Bianka – kaj aĝon: pli ol kvinjara ŝi estis. Mi eksciis ankaŭ ilian vojaĝ-celon: ĝi estis sud-okcidenthungara urbo Székesfehérvár. Do atendis ilin ankoraŭ sufiĉe da kilometroj da veturado kaj devo ŝanĝi en Budapeŝt ne nur vagonaron, sed ankaŭ trairi el la Orienta al la Suda Stacidomo.

Kiam jam nia vagonaro atingis la periferion de Budapeŝt kaj proksimiĝis la fino de mia veturado, el mia veturpakaĵo mi eliris dolĉan napolan stanĝeton kaj mi volis tion donaci al Bianka. Kaj tiam ŝia gaje senzorga mieno abrupte ŝanĝiĝis. Sen granda drameco, sed simple-serioze ŝi dankis min, kaj diris:

"Dankon, mi ne povas... tio enhavas sukeron."

La avino poste aldonis, ke antaŭ unu jaro la doktoroj malkovris en tiu eta korpo diabeton.

Netraesplorable estas la vojoj de Dio. Sed ĉu estas juste puni senpekulojn..?

Tiu demando ekde tiu tempo premas mian gorĝon kaj humidigas miajn okulojn. Plejkore mi deziras al vi, kara Bianka, ke okazu miraklo kaj vi reakiru vian sanon..!



Fotis: Theodor Andreas

## Leteroj de partoprenantoj de la Hungespola-renkonto 4-6 Aprilo 2008-a.

Post temofermo alvenis la peto, aperigi la sekvajn du mesaĝojn en nia gazeto. Ni dankas por la rekonaj, karaj vortoj de la sendintinoj:

„Inter la 4-a kaj la 6-a de aprilo 2008 en hungara urbo Miskolc okazis internacia renkontigo el ciklo "Multikultura Europo" kadre de la projekto ERDM - Internacia Jaro de Interkultura Dialogo. La partoprenantoj estis invititaj de la esperantistaj geedzoj Adrienne kaj László Pasztor. La ekskurso organizis Universitato de la tria aĝo el Nowy Sącz kaj sinjorino Halina Komar - prezidantino de Pola Esperanto-Asocio.

Dum la ekskurso ni havis okazon viziti la urbon Abaujszantó, kie troviĝas dommuzeo de Kálmán Kalocsay - eminenta Esperantisto, kaj verkisto en Esperanto, kiu naskiĝis en tiu loko.

Ni vizitis ankaŭ la urbon Miskolc kaj renkontiĝis kun honoraj membroj kaj prezidantoj de HEA (d-ro Endre Dudich kaj d-ro György Nanovfszky).

Ne mankis al ni atrakciaĵoj, kiel vizitado de vinkeloj kun vingustumado, baniĝo en la Terma kaj grotbanejo en Miskolc - Tapolca, vespermanĝo kun cigana muziko, dancado kaj kantado en la pola, hungara kaj Esperanto.

Ankoraŭfoje montriĝis ke Esperanto alproksimigas homojn el diversaj landoj, lingvoj kaj kulturoj.

Magdalena Tatara [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com)”

## „HUNGARA-ESPERANTISTA-POLA RENKONTO”

### „Pol’ Hungaro fratoj estas, glavo, glaso jen atestas”

En la tagoj 4-6 de aprilo 2008 polaj esperantistoj, kaj ne nur tiuj, vizitis hungarajn urbojn: Abaujszántó kaj Miskolc dum ekskurso organizita fare de geedzoj-esperantistoj: Adrienne kaj László Pásztor. La ekskurso estis perfekta okazo por ekkoni familian regionon de Kálmán Kalocsay, la urbon Miskolc kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, sed ankaŭ por ekkono de laboro kaj atingoj de gesinjoroj Pásztor. Estis tio ankaŭ okazo por firmigi niajn patriotajn sentojn.

Nia itinero kondukis de Abaujszántó al Miskolc. En Abaujszántó, loko de naskiĝo de Kálmán Kalocsay, ni vizitis memorĉambbron je lia nomo kaj sub lia busto-figureto ni kunmetis florbukedojn. Nia ĉiĉerono estis pensiita profesoro de la Instruisteduka Ĉeflernejo de Sárospatak, d-ro László Molnár. Dum festa tagmanĝo salutis nin la vicurbestro de Abaujszántó s-ro László Lukács . Li invitis nin por vingustumado en vinkelo, kie tre sprite li per speciala ilo verŝis vinon al kalikoj vekante nian admiron. Tiel do, ni komencis nian vojaĝon en etoso de la konata onidiro „Pol’ Hungaro fratoj estas, glavo, glaso jen atestas”, kiu akompanis nin ĝis fino de nia vojaĝo. En la aŭtobuso sinjorino Margareta Evva loka histori-konantino, prezentis la urbon Encs. Posttagmeze ni alvenis al Miskolc, kie ni okupis la ĉambrojn en la Kolegio de la Kalvinana Gimnazio „Lévay József”, monumenta/antikvaĵa konstruaĵo en la centro de la urbo. Ni renkontiĝis kun honoraj hungaraj esperantistoj, d-ro Endre Dudich kaj d-ro György Nanovszky kun kiuj ni povis interparoli kaj interŝanĝi vidpunktojn dum vespermanĝo.

La vetero favoris al ni, do ni ankoraŭ vespere promenadis, admirante trankvilan ĉarmon de la urbo. Sekvan tagon, sabate, antaŭtagmeze ni vizitis kalvinanan preĝejon kun sonorilturo sur la monto Avas, kie ni renkontiĝis kun pola pastro Bogdan Adamowicz. Ni ankaŭ vizitis situitan apude tombejon, kie ni kunmetis florbukedojn sur (la) tombo de la prezidanto de E-klubo d-ro Ludoviko Györy Nagy. Li kune kun sia frato Stefano kreis la muzikon de la Avas-monta sonorilturo je memoro de la 50-a geedziĝa datreveno de siaj gepatroj. Tiu turmuziko estas nuntempe la muzika signalo de la Radio Miskolc.

Komunan nian admiron vekis vizito en Ortodoksa Preĝejo „Sankta Triunuo”. Paŝante tra la preĝejo ni kun admiro haltiĝis antaŭ la plej bela kaj plej granda ikonostazo, unike bela en Mez-Eŭropo (ĉ. 16 metrojn alta, sur kiu oni lokigis 88 bildojn).

Ni faris ankaŭ agrablan promenon kun nia gvidantino, Adrienne Pásztor en urbocentro. Preskaŭ ĉiuj fotis ŝin. Ĉe la memortabulo de L.L.Zamenhof en Miskolc, ni metis florkronon kaj lumigis memorkandeleton.

Posttagmezon ni pasigis en banejo - Grotbanejo de Miskolc-Tapolca. La terma banejo ĉizita en la roko, ne estas simila al aliaj.

Vespere Adrienne kaj László preparigis al ni en la restoracio „Kisvadász (Ĉasisteto)” vespermanĝon kun cigana muziko kaj kantado.

Dimanĉe matene, ni ankoraŭ povis viziti en Lillafüred la Palac-hotelon, kiu estas unike la plej bele situita hotelo de Hungario proksime al la lago Hámori.

Dank’ al ĉi tiu ekskurso ni ekkonis ne nur la naturan vivon sed precipe socion . Ĝi permesis al ni konfronti kaj fiksi scion akiritan en la lernejo. Renkontiĝo kun eminentaj homoj, kiuj estas certe gesinjoroj Pásztor, instruis nin zorgi pri memoraĵoj kaj ami la patrujon.

En la ekskurso ĉeestis ankaŭ neesperantistoj. Kaj ĵus ili povis vidi reciprokajn rilatojn inter esperantistoj, ilian kolegaron, amikecon kaj kapablon de grupa kunlaboro kaj komuna ludo. Por ili ĉi tiu rekontiĝo estis specife eksterordinara. La etoso kaŭzis, ke akompanantaj min amikoj (neesperantistoj), decidis lerni Esperanton.

Oni povas diri, ke tiaj ekskursoj estas la plej efikaj, la plej atrakcia koncepto de komunikado kaj rimedo por transdoni la scion pri Esperanto kaj Esperantio. La vojaĝo permesis al mia

familio kaj miaj amikoj ekkredi, ke Esperanto malfermas antaŭ ni la mondon, donas novajn eblecojn ekkoni kaj trovi geamikojn kaj sampensulojn.

Ĉi tiu vojaĝo estis ankaŭ tre grava pro aliaj kialoj. Observante geedzojn Pásztor, ni lernis patriotismon. La vorto jam en hodiaŭa tempo preskaŭ forgesita. Tiel do mi observis patriotismon de Adrienne kaj László, esprimiĝantan en ilia korligiĝo/sindonemo al sia patrujo, al Esperantio, al naciaj kutimoj, moroj kaj kulturo sed ankaŭ patriotismon esprimantan estimon kaj amon por la homoj.

Jam en Abaujszántó estis videbla tiel nomata „amo por Malgranda - Granda Patrujo”. Tiu senpera observo liveris travivaĵojn, kiuj etis firme akceptitaj fare de la menso kaj koro .

Mi estas konvikita, ke ĉi tiu renkontiĝo vekis en ni ravitecon pri belo de la naturo, pejzaĝo kaj ankaŭ pri la homaj verkoj. Vekis sentemon al belo, kiu malofte estas perceptata en nia ĉiutaga vivo.

Adrienne kaj László montris al ni sian malegoistecon kaj ĝojon esti utilaj por aliaj. Certe tial, la vojaĝo estis tiel perfekte preparita kaj impresis per korsentaj kaj humanismaj valoroj.

Małgosia

(Małgorzata J. Komarnicka

estraranino de ILEI-PL,

ekskurso-partoprenantino”)

Ni ankas la rekonajn vortojn de la leterskribantoj.

Adrienne kaj László Pásztor

## **Gramatika rerigardo neniam malsufiĉas**

### **Komenteto**

#### **sen flugmaŝino kaj kun biciklo**

Kuris vi kun granda viglo,  
mi veturis per biciklo.  
Pro koler' vi radon rompis,  
kriis, ke mi simple - trompis!

Nun vi, sen biciklo, bruas,  
kaj mi kurus... sen biciklo,  
sed mi kuros... kun biciklo.

Ŝvit' jam banas la vizaĝon:  
kial vi ne havis saĝon,  
kial saĝon mi ne havis,  
kiam mi biciklon – havis.

Vi, bruanta, ŝajnas ĝoji,  
mi, kuranta, ŝajnas plori.  
Mi, kurante, tamen vidas,  
vi, bruante, min ne vidas.

Balázs Wacha (Blazio Vaha pri la listo esp-en-hung



## **ILEI INVITAS VIN AL KONFERENCO EN AFRIKO!**

Jen unika ebleco konatiĝi kaj aktive esperantumi kun afrikaj samideanoj:

La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino)  
29 julio-5 aŭgusto 2008

### **ILEI-Konferenco en Afriko Kial?**

Ĉar:

- E-agado en Afriko bezonas sian ILEI-dimension:
    - en Afriko estas multaj lernemuloj kaj malmultaj E-instruistoj
    - instrukapabligado estas prioritata tasko de ILEI
  - E-instruistoj de Afriko deziras pli komuniki kun kolegoj por:
    - spertiĝi pri ILEI kaj lerni el ĝia historio
    - perfektigi siajn lingvokapablojn kaj spertiĝi pri didaktiko
    - plikonatiĝi kun instrumaterialoj, helpiloj kaj metodoj por E-instruado
  - Afrika E-ujo povas oferti al tutmonda E-movado multon, sed:
    - vojaĝoj al E-aranĝoj en aliaj mondopartoj estas tro kostaj por ili
    - malmultaj vojaĝoj per helpo de amikoj de Afriko ne sufiĉas
- Afriko de proksime —ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!

### **Instruistoj de Esperanto por la PlanedoTero**

ILEI-konferenco en Afriko estos grava evento por la E-movado entute, por la historio de ILEI kaj por la E-movado en Afriko. Partoprenu la konferencon por kuraĝigi la samideanojn en Afriko kaj omaĝi iliajn klopodojn por disvastigado de E-o en la tuta mondo.

Instruista trejnado en Afriko estas prioritata tasko por ILEI. Grava paĝo de tiu agado estis la trejnseminario en 2007 samloke, kie okazos la konferenco. Ankaŭ per tio ILEI subtenis la klerigadon de afrikaj gekolegoj, kiuj havas malmultajn eblecojn partopreni internaciajn renkontiĝojn, rekte kontaktiĝi kun gekolegoj, interŝanĝi spertojn pri metodiko, didaktiko de Esperanto-instruado.

En la 41-a sia konferenco ILEI proprakoste financos partoprenon de 20 afrikaj samideanoj por ilia pluklerigado. Financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko bonvenos al la konto ilek-a de ILEI ĉe UEA, aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko “Benino 2008”.

Venu al la konferenco, ke ni kune serĉu la respondojn!

Vidu fotojn el nia konferenclando kaj filmitajn invitojn en:

<http://www.ilei.info/novajxoj/benino.php>

Informoj pri la konferenco, programo, urbo, partoprenkondiĉoj en

<http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php>

Reta aliĝilo en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php>

Se vi havas demandojn proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Aida Ciĝikaite (ILEI-estrarano pri konferencoj) [aidute@mail.it](mailto:aidute@mail.it) kaj Charles Alofa (loka ĉeforganizanto) [alofkarlo@yahoo.fr](mailto:alofkarlo@yahoo.fr).

BONVENON!

Renato Corsetti/Korseti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina

Italujo <renato.corsetti@esperanto.org>

**Stefano Pál**  
**HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO**  
- daŭrigo -  
**PARTO TRIA**

Reviviĝantaj Esperanto-grupoj/1945-1956/  
**En Hejőcsaba, Miskolc, Diősgyőř**

### **Membrokotizo 500 „pengő” – Unuiĝita Societo**

En la sudorienta landparto jam en 1944 – post ĉeso de la bataloj – en Orosháza oni aranĝis esperanto-konferencon. Post liberiĝo de Budapeŝto en 1945 kaj la Hungara Landa Esperanto-Societo kaj la Societo de Hungarlandaj Esperantistaj Laboristoj ekkomencis siajn funkciadojn. Plej grava farendo estis en la lerneja instruado la enkonduko de Esperanto. En 1946 komenciĝis ankaŭ esperantlingva dissendo de la Hungara radio.

Ankaŭ en Miskolc malrapide normaligi la situacio por reviviĝo de la Esperanto-grupoj. Adalberto Lehőczky denove ricevis fine de januaro 1946 novan membrolibron de Societo de Hungarlandaj Esperantistaj Laboristoj, kies vicmontra numero estis:177. Li komencis sian agadon en Hejőcsaba. Adalberto Lehőczky jam la 14-an de Januaro 1946 skribis leteron al centro de Laborista Esperantista Societo, de ĝi li petis 5 novajn membrolibrojn por reorganizado de la grupo./ La membrokotizo estis 500 „pengő”./ Unupaĝan respondleteron de la societo – datite 20-an de Januaro 1946 – Adalberto Lehőczky gardis. Oni aranĝis en Orosháza en 1946 Esperanto-kongreson kaj en 1947 en Pécs, kie decidis unuiĝon de la du hungarlandaj societoj kiuj kune kun plufunkciis.

En intereso de tiu ĉi celo oni kunvokis konferencon de la miŝkolcaj esperantistoj la 22-an de Julio 1947, dum kiu Ludoviko Király prezidis. Ankaŭ Adalberto Lehőczky ĉeestis. Laŭ rezolucio ili petis la landan societeton por fondi lokan Esperanto-grupon.

Laŭ la centra esperantlingva gazeto la konferencon kaj grupofondon ili planis okaze de 60. jara datreveno de naskiĝo de la lingvo /13 de Julio 1887/. La loka grupo elektis estraron, en kiu prezidanto estas Ludoviko Király, vicprezidanto: Johano Kozma, sekretario: Adalberto Lehőczky, kasisto: Márta Váry, notario: Antono Répássy, advokato: D-ro Ludoviko Győry Nagy.

### **Lernokursoj, instruado – Pli nova paŭzo**

Okazis iniigo de la du Esperanto-societoj kaj Adalberto Lehőczky ricevis de 1948 novan membrolibron, kies vicmontra numero estas 503. Li petis la 14-an de de Januaro 1948 en letero de la B.A.Z. departementan lernejan inspektiston, ke la bazlernejo de Hejőcsaba certigu iun lernoĉambron por Esperanto-lernokurso. Li ricevis la permeson.

Kiam en 1946 iu ministra dekreto permesis en la komercaj lernejoj instruadon de Esperanto, tiam Ludoviko Király en la miŝkolca komerca mezlernejo pritaksis la interesiĝantojn, ilia nombro estis 65. La dekreto permesis nur 20, pli malfrue 25 gelernantojn. La lernokurso daŭris de 15 Decembro 1946 ĝis fino de Majo 1947 kaj iu lernantino, Magda Nagy prelegis tre ege sukcese en la Studentoparlamento.

La 22-an de Julio 1947 dum la miŝkolca konferenco oni decidis organizadon de pluraj komencaj kaj progresaj lernokursoj, kiuj en la lernojaro 1946/1947= konatigis Esperanton al multaj miŝkolcanoj. Ĉi tiu kontribuis al evoluo de la urbo. La lernokurson Ludoviko Király gvidis.

Post la grupouniĝo la movado povis evolui nur malintensive. Pro la rekonstruadaj laboroj oni ĉesigis la movadajn laborojn. Laŭ aliaj fontoj en la societo estis karakteriza dum jaroj de la personkulto la malkonfido. Stefano Temesi, miŝkolca fervojista esperantisto, kiu en 1946-47 ellernis la lingvon, ankaŭ dum la paŭzo havis kontakton kun budapeŝtaj esperantistoj kaj ĉi tiel informiĝis pri la okazintaĵoj.

### **Komenciĝas en Miskolc - Lernokurso kaj grupo**

Laŭ la Esperanto-historiaj fontoj la landa esperanto-movado denove komenciĝas en 1955-56. Sed en Miskolc Stefano Temesi jam printempe en 1954 organizis Esperanto-lernokurson, samtempe komencis redakti la „Verda vojo” titolajn ĵetpaĝojn kaj samnome fondis grupon ĉe la Veturilriparejntrepreno de Hungaraj Ŝtatejoj

Ankaŭ Adalberto Lehóczky, estro de miŝkolca grupo de la Laborista Esperantista Societo ne atendis la centran direktadon. Li skribis unu=paĝan peticion al Uzina Komitato de Metalurgia Kombinumo „Lenin” por permesi komencadon de ok=persona lernokurso. Li aludis al stockholma alvoko de la Tutmonda Packonsilantaro kaj en revuo „Szabad Nép”/Libera popolo/ /24 Februaro 1955/ aperita artikolo pri apogado de favoraĵoj. Prezidanto de uzina komitato tiun konfirmis. Iniciatado de Stefano Temesi kaj Adalberto Lehóczky estis pionira en la fervojaj kaj metalurgiaj uzinoj, ja ankaŭ en Budapeŝto nur la 4-an de Aŭgusto 1955 fondiĝis la unua Esperanto =grupo en la placo Engels kaj unue la 17-18-an de Septembro oni aranĝis Esperanto-Pac-renkontiĝon. Tiutempe fondiĝis la tn. Landa Esperanto-Konsildona Komitato.

### **Grupo en Diósgyőr - Forrestinta renkontiĝo**

Post la sukcesa lernokurso en 1955, fondiĝis grupo ĉe la Metalurgia Kombinumo „Lenin”. Ĉi tiu grupo ricevis leteron la 13-an de Novembro 1955:”Karaj gesamideanoj! Dua plena kunsido de la Landa Esperanto Konsildona Komitato sendas sian varmegan samideanansaluton. Ni deziras, ke akceliĝado de la Hungara Esperanto-Movado estu daŭra kaj sukcesoj, elstaraj rezultoj helpu viajn laborojn...”

Adalberto Lehóczky la 2-an de Septembro 1955 lanĉis novan lernokurson en la Metalurgia Kombinumo „Lenin”, al kies Esperanto-fakronda adreso alvenas la leteroj, gazetoj. Ankaŭ la 3-a plena kunsido de la Landa Esperanto-Konsildona Komitato salutis la Esperanto-fakrondon de Metalurgia Kombinumo „Lenin”. La komitato instigis Stefanon Temesi, Paŭlon Balkányi kaj Adalberton Lehóczky por aranĝi teritorian Esperanto-Renkontiĝon. En jaro 1956 la anoj de lernokurso kaj fakrondo en la Veturilriparejntrepreno de Hungaraj Ŝtatejoj komencas viglan korespondadon, en la uzina gazeto propagandas, en la Kulturdomo de Hungaraj Ŝtatejoj aranĝas pacletervesperon kun gastoj el Ózd, Sárospatak, Diósgyőr, Hejőcsaba. La pacletervesperon gvidis Francisko Czako. Stefano temesi raportas pri siaj bulgariaj kongresaj travivaĵoj, poste oni planas la 27-28-an de Oktobro 1956 Nordhungarian Esperanto-Renkontiĝon, apogante de la Landa Esperanto-Konsilantaro. Sed tiu ĉi ne okazis pro la oktobraj okazintaĵoj.

## **La „Verda vojo” en Miskolc - en la lando estas la unika**

La Esperanto-Fakrondo en la Kulturdomo „Erkel Ferenc” de Hungaraj Ŝtatifervojoj eldonadas en 1956 Esperanto-informilon „Verda vojo”, redaktitan de Stefano Temesi, je servado de la paco kaj kulturelaboro. La ĉefartikolojn skribis Paŭlo Balkányi. La multobligita gazeto okupiĝis pri okazintaĵoj de Esperanto kaj paco de la lando kaj eksterlando. Ĝi komunikis skribaĵojn de landaj raportistoj.

En 1956. oni organizas lernokurson kaj fondas fakrondon ankaŭ en la maŝinfabrika DIMÁVAG, ties sekretario estas Nikolao Matula. Lernokurso komenciĝas ankaŭ en miŝkolca sindikata rezidejo /nr.11. str.Kossuth/.

En Miskolc oni akceptas ankaŭ la esperantan propagandon. Vilhelmo Radnay metas bildkartojn en du ĉefstrataj montrofenestrojn, ĉe la presejo ankaŭ librojn.

De Januaro 1957 la „Verda vojo” aperis litografe, redaktite de Stefano Temesi kaj de Stefano Pál. Ĉefkunlaborantoj estis Paŭlo Balkányi kaj Johano Kozma. La eldonkvanto komence estis 400, poste 500 ekzempleroj. Laŭ la statistiko ĉi tiu estis tiutempe la nura Esperanto-gazeto en Hungario.

## **Pri Nordhungariaj Esperanto-Renkontiĝoj 1957-1961**

### **Esperanto-placo, Esperanto-fonto, Zamenhof-strato.**

#### **Renkontiĝo en Miskolc - Esperanto-placo**

La plej signifa okazintaĵo de jaro 1957 estas la 1-a Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo en Miskolc, la 13-14-an de Julio. Antaŭ tiu en Majo 1957 fondiĝis en nr.11.str.Kossuth denove Esperanto-grupo kaj aranĝkomitato. Kvankam du semajnojn antaŭ tiu en Szeged estis la Sudhungarlanda Renkontiĝo kaj en la lando epidemiis, tamen ĉeestis 150 partoprenantoj. Julia numero de „Verda vojo” pleniĝis per miŝkolcaj interesaĵoj, ĉefe skribite Ludoviko Király. En la aŭgusta numero sekviĝas detala raporto de Stefano Temesi.

Laŭ la programo Ludoviko Király inaŭguris la placon Esperanto, li prezidis dum la kunsido, kie Julio Baghy, prezidanto de Hungara Esperanto-Konsilantaro diris la festan parolon. Alparolis Ludoviko Márton ĉefsekretario de la Landa Esperanto-Konsilantaro kaj Paŭlo Balkányi nome de la Esperanto-pacorganizaĵo. Fakkunsidon de la fervojistoj gvidis Stefano Bácskay. La belegan ekspozicion aranĝis Vilhelmo Radnay. La renkontiĝon partoprenis Tódor Kovács, la tiam vivanta plej malnova hungara esperantisto. Pri la renkontiĝo donis sciigon la Miŝkolca Radio kaj revuo Északmagyarország /Nordhungario/. Reputacion de la renkontiĝo pliiĝis tio, ke en revuo Északmagyarország artikoloj de Ludoviko Király aperis pri historio kaj literaturo de la esperanto-lingvo. La landa renkontiĝo havis ankaŭ organizantan forton, ĉar grandnombra lernokurso komenciĝis denove en la „Erkel Ferenc” Kulturdomo /Ludoviko Király gvidis tiun kaj havis 32 personojn./ kaj fondiĝis la dua Fervojista Esperanto-Fakrondo en Miŝkolca Direkcio de Hungaraj Ŝtatifervojoj la 21-an de Decembro 1957.

Krom la Urba Komitato de Patrota Popolfronto kaj Packomitato de la urbo fondiĝis ankaŭ la Esperanto-Packomitato, kies gvidadon oni komisiis al D-ro Ludoviko Györy Nagy.

## **Renkontiĝo en Eger. – Kongreso en Varsovio.**

Post la unua nordhungaria sukcesa esperanto-renkontiĝo en 1958-60 atingis unu la alian la okazintaĵoj. Dum ĉi tiuj tri jaroj du nordhungariaj renkontiĝoj kaj en Varsovio la jubilea 44-a mondkongreso kreskigis rangon de Esperanto- movado. Ne nur en Miskolc, sed ankaŭ en B.A.Z. departemento vigliĝas la organiza vivo kadre de la lermokursoj kaj fakrondoj.

La jaro 1958 komenciĝis malgaje. La 3-an de Januaro mortis Johano Kozma, kiu esperantiĝis en 1911, ano de miŝkolca grupo, kunlaboranto de la „Verda vojo”.

En Marto oni inaŭguras memstaran Esperanto-ĉambron en la fervojista kulturdomo, la urba fakrondo iniciatas kolektadon al kostoj de la Esperanto-placa memortabulo.

De Septembro la urba fakrondo eldonas multobligitan informilon „Miŝkolca Esperantisto”. Oni eldonas Esperanto-gramatikon de Ludoviko Király.

La estraro estis en 1958: Prezidanto: Ludoviko Király, sekretario Ludoviko Solticzky, kasisto: Márta Váry. La 4-5-an de Oktobro 1958 en Eger oni aranĝis la 2-an Nordhungarian Renkontiĝon, dum kiu anoj de la tri miŝkolcaj grupoj partoprenis kaj faris ekzamenon. La ekzamenanto estis Julio Baghy. En 1959 okazis reelektado de la estraro. Ĉe la sindikata urba grupo estis prezidanto Ludoviko Király, organizanta sekretario: Stefano Pál, sekretario: d-ro Menyhért Ádám, ekonomia respondeculino: Márta Váry. Ĉe la fervojista grupo „Verda vojo” estis prezidanto Stefano Temesi, sekretario: Francisko Czakó, kasisto Julio Árvay.

En Edelény kaj Sajóbáony delegito de la miŝkolca grupo: Stefano Pál. Li gvidas lernokurson kaj prelegis pri Esperanto en la miŝkolca markkolektanta fakrondo. La „Verda vojo”, redaktite de Stefano Temesi aperas sisteme. Ĉe la fervojista fako funkcias 16 fervojistaj Esperanto-grupoj, el inter du grupoj en Miskolc.

La 15-an de Decembro 1959 sur placo-Esperanto oni inaŭguris la novan marmortabulon. Dum tiu Ludoviko Solticzky diris la memorfestan parolon.

- daŭrigo sekvos -

## **Ŝerco**

### **Mituloj**

- Sinjoro doktoro, mi fartas malbone, tre doloras mia stomako. Eble de la manĝitaj mituloj.
- Ĉu ili estis freŝaj ?? – demandis la doktoro, observante la ventron de la malsanulo.
- Kiel mi devus scii?
- Kiel ili aspektis, kiam vi malfermis ilin?
- Ĉu? Ĉu mi devintus malfermi ilin?

### **La maldika bebo.**

SinJORINO kun bebo iris al kuracisto.

- Sinjoro doktoro, ĉi tiu bebo malrapide kreskas, malpli pezas ol la similaĝaj beboj.

- Ho, sinJORINO, bonvolu iom malvestiĝi ĉar mi volas observi vian bruston.

La doktoro akurate observas, esploras la mamojn de la virino. Li tuŝas, karesas, premetadas, kaj finfine diras:

- Do, kara sinJORINO, la problemo estas, ke vi tute ne havas lakton en viaj mamoj.

Jes, Sinjoro doktoro, kompreneble. Mi estas la avino, sed verdire la esplorado tre plaĉis al mi.

## La saĝa edzino

Mia kara edzino!

Vi devas scii, ke vi jam estas 54 jaraĝa, kaj mi havas tiajn dezirojn, kiajn vi jam ne povas kontentigi.

Verdire mi estas kontenta pri vi, vi estas bona edzino, kaj mi tute ne volas, ke vi ofendiĝu.

Sed kiam vi legos ĉi leteron, mi jam estos en Grand Hotelo kun mia 18 jaraĝa asistantino. Antaŭ noktomezo mi estos denove hejme.

Via edzo.

En la hotelo la edzon atendas faksita letero:

Mia kara edzo!

Ankaŭ vi estas 54 jaraĝa, kaj kiam vi ricevos ĉi tiun faksleteron, mi jam estos en Breakwater Hotelo kun 18 jaraĝa naĝmajstro.

Ĉar vi estas bonega matematikisto, vi facile povos kalkuli, ke 18 estas plioble en 54, ol la 54 en 18.

Salute: via edzino.

[www.amikumu.com](http://www.amikumu.com) Gábor Graf el Mór

## Nordhungario – hungara literaturo

El inter formigantoj de la kultura vivo en nia regiono vi povis konatiĝi pasintjare kun sinjorino Klara Domahidi, kies novelon – La diablo ne dormas - ni prezentis.

Nun ekkonatiĝu kun ŝia edzo, kiu estas prezidanto de Reta Societo de la Hungaraj Kreantoj.



La fotopentraĵo estas verko de Veronika Simon M.

### Aŭtobiografio de Aleksandro Szabó

Mi naskiĝis la 14-an de novembro 1970, en Miskolc. Mi finis la bazlernejon en Kisgyőr, fakmezlernejon en Kazincbarcika.

Mi skribas poemojn ekde 1988.

Mi ekzercis diversajn batalartojn, dum 12 jaroj.

Ekde 1977 mi estas ano de Societoj de Montosubaj Kreantoj.

Ekde 2001 mi estas prezidanto de Reta Societo de Hungaraj Kreantoj.

Ekde 2008 mi esas ano de Societo de Verkistaj Naŭuloj kaj de Internacia Rondo de la Vivantaj Hungaraj Verkistoj, poetoj.

Mia memstara eldonita volumo portas la titolon „Sentoj.”

Miaj premioj estas:

-Premio „Mikelo Lindák” - 2006., premio „ Pro nia Kreanta komunumo” –orgrado – 2006.,  
- Honordiplomo de urbo Szerencs., honordiplomo de Societo de Montosubaj Kreantoj – 2006.

Miaj poemoj aperis en la sekvaj antologioj:

Sur senvojaj vojoj –Societo de Submontaraj Kreantoj - 1998

Lumo kaj ombro - Reta Societo de Hungaraj Kreantoj – 2004

Mi kantas la printempon – Reta Societo de Hungaraj Kreantoj - 2005

Kun malfermita koro - Reta Societo de Hungaraj Kreantoj - 2006

Ĉieldirektoj - Societoj de Submontaraj Kreantoj - 2007

Ribelanta bardo - Societo kaj Submontaraj Kreantoj kaj Reta Societo de de Hungaraj Kreantoj – 2007.

Mi ankaŭ fotas.

*Miaj sukcesaj foto-konkursoj:*

- „Kun malfermita koro” – fotokonkurso – I.premio.- ties foto: „ Sentempeco” ( 2006 )
- Dum ekspozicio de II. Tarcal-a Montosuba Kreantaro: III premio de la ĵurio ( 2006 )
- „Ribelanta bardo” – fotokonkurso – III. premio - ( 2007 )

Nia sekva ekspozicio estos la 21-an de majo 2008, je la 17-a horo en vilaĝo Kisgyőr en la Vilaĝdomo, kie la foto „Sentempeco” estos ekspoziciita.



Sentempeco – Kisgyőr

Aŭtobiografion de Sándor Szabó, tradukis: László Pásztor

## Adrienne, sinjorino Pásztor

### De buŝo al buŝo

Ni estis junaj geedzoj, kaj multe ekskursis. Ĝoje ni aŭskultis la historion de la fortikaĵo *Boldogkővár*, kiam ni estis tie. Poste ni ekhavis ideon, ke ni ŝatus foje aŭskulti iun popolan fabel-rakontan. Ni ŝatus vidi, kiel ŝi parolas, ĉu absorbigas sin mem en la rakonton?

En Boldogkővár la konsultita virino direktis nin al malalta domo, dirante, ke la maljuna onjo vivanta tie ege ŝatas paroli.

Ni facile trovis la domon. Malferminte la pordon, ni vokadis la dommastrinon, sed neniu akceptis nin. Ni eniris la korton. Fine ni aŭdis la maljunulinon vokadi sian kortobirdaron en la malantaŭo de la korto. Ŝi ĵetadis grejnojn al la gekokoj, sed ankaŭ kelkaj paseroj alflugis tien rapide. Ŝi portis malhelan vestaĵon, kaptuko kovris ŝian blankan hararon. Turniĝinte ŝi ekvidis nin starantajn ĉe la barilo.

Ni diris saluton kaj klarigis, kial ni vizitas ŝin. La maljunulino senvorte aŭskultis nin, poste eniris la domon. Reveninte post nelonga tempo, helblua antaŭtuko estis sur ŝi kaj ŝi kunportis du seĝojn. La onjo proponis ke ni sidiĝu sur tiujn. Ni dankis kaj sidiĝis. Ŝi sidiĝis sur benketon, perdorse apogiĝante al la muro de la domo, ĝuste vid'al vide al ni. Ŝi demandis, ĉu ni vere ŝatus aŭskulti de ŝi ian malnovan historion? Ni jesis.

Nu, estas unu, certigis la onjo, sed tiu ne estas fabelo, sed vera historio. Ni estos la unuaj, kiuj aŭskultos ĉi tiun historion de ŝi, ĉar ĝis nun ŝi rakontis ĝin al neniu. Ŝi aŭdis ĝin de sia patrino, kaj tiu de sia avino: la rakonto flugas en la familio de buŝo al buŝo. Ĉu ni ne bedaŭras, se tio estos malgaja? Ni diris, ke ankaŭ tiam ni volonte aŭskultos ĝin.

Ŝi ekparolis, sed baldaŭ signalis, ke la magnetofono ĝenas ŝin, ni elsaltu ĝin. Ni obeis, kaj nun ŝi jam senĝene komencis rakonti la historion.

La evento okazis, kiam la posedantoj de la fortikaĵo de *Boldogkő* (Feliĉa Roko) estis veraj “reĝoj” de la regiono. La estro de la fortikaĵo eĉ nomigis sian filinon reĝidino.

La patro tre amis ŝin, ĉar ŝi memorigis lin al lia mortinta edzino. La fraŭlineto havis okulojn bluajn kiel la somera ĉielo. Ŝia hararo estis kiel la stipoj kreskantaj sur la altaĵetoj apud la fortikaĵo. Amegis ŝin ankaŭ la servutilinfano kiu ludis kun ŝi.

Tiam pli blua estis la ĉielo, pli densa la verdaro de la kampoj, kaj pli orkoloraj la spikoj sur la plugkampo. Kiam la reĝidino iris promeni kaj la servutulo akompanis ŝin, li ĉiam allogadis la birdetojn de siaj nestoj per fajfado. Li faris florbukedon por ŝi el la freŝe kreskintaj heleboro, pulsatilo kaj violo. Por ke ŝiaj ŝuetoj ne iĝu kotaj, li metis sian ĉemizon sur la teron antaŭ ŝi. La servutulo pensis, ke li volonte donus la vivon por la fraŭlineto, ĉar li tre amis la afablan rideton kaj la pure sonorantan ridon de la blonda reĝidineto. Kiam la severa patro tion ne vidis, ili kune karesadis la katidojn, kaj babiladis. Ili estis bonaj geamikoj.

La tempo pasis, kaj la fraŭlineto iĝis dekŝes-jara. Iun tagon la patro deklaris, ke li trovis edzon por sia filino, kaj post kelkaj tagoj okazos la gefianciĝo, poste baldaŭ la geedziĝo.

La fraŭlino emis unue ekkoni la fianĉon, sed tiun la patro ne permesis. Tamen post kelkaj tagoj ŝi sukcesis ekvidi, kvankam nur el malproksime, la estontan fianĉon. Ŝi tre malgajiĝis, ĉar li estis maljuna. Ŝi persvadis sian amikon helpi ŝin fuĝi – kaj ankaŭ li forkuris kun ŝi. La gardistoj nur malfrue malkovris la fuĝon. La patro unue lasis ili fuĝi, sed poste ordonis reporti ilin.



La gejunuloj kuris en senvojaj regionoj. Nokte ili marŝis, tage ripozis. Sed el la fortikaĵo oni ĉiam spektis, kie ili troviĝis, ĉar el tiu loko malproksime estis videbla ĉio. Dum la kurado la dornoj de la herbaĉoj disŝiris iliajn vestaĵojn, la ŝtonoj de la rivereto sangigis, vundigis iliajn piedojn, la branĉoj de la arbedoj skrapis iliajn brakojn. Ili manĝis nur sovaĝe kreskantajn fruktojn, ĉar ilia paneto jam delonge finiĝis. En la valo de la rivereto *Szerencs* (Serenĉ) en bosko, kie ili volis ripozi, la soldatoj de la severa patro kaptis ilin.

La fraŭlinon tuj levis al sia selo la estro de la taĉmento. La manojn de la servitulfraŭlo la soldatoj ligis al la sel-arko, kaj tiel ili trenis lin hejmen. Tie lin atendis arestejo, malhela kelo; la fraŭlinon oni vestis en fianĉinan vestaĵon.

Baldaŭ okazis la gefianciĝo, poste la geedziĝo. Post la ceremonio kaj la geedziĝa bankedo – drinkfesto la geedza paro ekiris al sia malproksima hejmo. Sed ili eĉ la pordegon ne atingis, kiam iu ĝeno okazis malantaŭe. Oni alportis la kadavron de la servitulfraŭlo.

Tiun liberigis de lia korpa kaj anima suferoj iu malgranda serpento. Ĝi tiam ekmordis lin, kiam oni enpuŝis lin en la karceron kaj li falis sur ĝin.

Post la rakonto la maljunulino longe silentis, kun larmohavaj okuloj. Poste ŝi forviŝis la larmojn kaj adiaŭante petis nin, ke sian historion ni bone eluzu, bone prizorgu.



Boldogkőváralja (Wikipedia)

## FUNEBRO



Mi informas Vin - laŭ informo de la hungara korespondlisto lingvolanĉilo, - ke sinjoro Zoltán Szabó en vilaĝo Egerfarmos / la elpensanto de Esperanto-vilaĝo/, mortis la 27-an de Aprilo 2008-a. Li estis jam tre aĝa, (ĉirkaŭ la 86-a) kiam li komencis labori tiurilate, sed li ne povis realigi sian sonĝon pri la kreo de Esperanto-vilaĝo. La tie Esperanton lernantaj vilaĝanoj kaj iliaj aliurbaj helpantoj daŭrigi volas lian laboron

Estu benata lia memoro!

Adrienne Pásztor



## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)